Gmail — Paulo Pires <flugfolio.xyz@gmail.com>

# [uea-membroj] EKO 5 Graz

1 mensagem

**Stefan MacGill via groups.io** <stefan.macgill=gmail.com@groups.io> 20 de fevereiro de 2026 às 04:47
Responder a: uea-membroj@groups.io
Para: listo 'nova uea-membroj' <uea-membroj@groups.io>

Stefan MacGill

Respondecoj en UEA: Landa Agado, AMO, EKO, Canuto.
Respondecoj en ILEI: Loka kaj landa agado, Juna amiko.

## EKO 2026-5 feb 19

## Kongresa kresko por Graz

Je la 1a de februaro 2026 al la 111a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026 en Graco (Aŭstrio) aliĝis 712 personoj el 55 landoj, plejmulte el Germanio (104), Pollando (74) kaj Francio (63). Legu pli en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2026/02/graco-11

La urbodomo de Graz estas belega kaj rekonebla konstruaĵo, kiu staras en la mezo de la urbo kaj gastigas la urban registaron. Ni eĉ ne devas rekomendi al vi ne maltrafi ĝin dum la venonta Universala Kongreso de **#Esperanto**: nia kongresejo estas trans la strato, do vi ne povos preteratenti ĝin!

La unua urbodomo de Graz estis konstruita en 1450. Sed ĝi estis tro malgranda kaj 100 jarojn poste oni konstruis novan urbodomon en la nuna loko, ĉe la ĉefplaco. Ĝi tamen estis plene malkonstruita en 1803 por rekonstrui ĝin en nova stilo. En la fino de la 19a jarcento ĝi estis pligrandigita kaj akiris sian nunan aspekton.

**#esperanto2026** //pic

## Bunta rikolto de la kunpensado

Jen la video de la 68a Kunpensigado (Amri Wandel pri IKU, Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova pri la IKU-libro kaj sia instruado en rusia universitato, Viko pri seminario pri misinformado en Seviljo).

https://www.youtube.com/watch?v=C6VV-5RF4mw

## Jegerovas pri la historio de BET

Dum la Sovetunia periodo la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) por la esperantistoj de USSR anstataŭis la Universalajn Kongresojn de Esperanto, kiujn sovetunianoj preskaŭ ne povis partopreni. Komence ĉi tiuj someraj renkontiĝoj nomiĝis Ĉebaltaj Esperantistaj Tendaroj (ĈET), poste Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET) kaj fine Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). La plej unua ĈET okazis la 1-14an de aŭgusto 1959 en Baltezers (Latvio) kun nur 48 partoprenantoj.
Ekde tiam ĈET/BET estis okazigata laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio. La plej freŝa BET-59 okazis en julio 2025 en Kaŭno (Litovio) kun 296 aliĝintoj, el kiuj ĉirkaŭ 250 efektive partoprenis.Estas aktualigita la resuma tabelo pri ĉiuj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) ekde ĈET-1 en Baltezers (Latvio, 1959) ĝis BET-59 en Kaŭno (Litovio, 2025).

Vidu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2024/05/bet-11/

**Nova bulteno de UN Numero 80 – januaro – februaro 2026**

- Universala Esperanto-Asocio elpaŝas pri homaj rajtoj.
- UEA funebras la forpason de ĵurnalisto kaj gvidanto Roman Dobrzyński.
- Esperantistaj instruistoj kongresos en Ĉinio.
- Universala Esperanto-Asocio kaj Monda Brajla Tago 2026.

## Principoj de konduto laŭ Woudji

Ekkoni la lokanojn. Konu la lokanojn, la reguloj de deco restas sufiĉe striktaj .Jen kelkaj principoj por scii kaj respekti por vojaĝi kiel eble plej bone kaj ekkoni kun la lokanoj. La Salutado estas esencaj islamanoj ĝenerale uzas la tradician (As Salaam Alekum) al kiu li respondas (.Alekum Salaam) Signifas paco estas kun vi. Sekvas aliaj demandoj , kiel vi fartas? kiel fartas via familio? kaj kiel fartas la homoj en via vilaĝo? , la atendata respondo estas ( Al Houmdoul'Allah )

## Kursoj en Moskvo

Irina Gonĉarova, konata Moskva Esperanto-instruistino, dum tri monatoj gvidis ĉiutagan kurson de Esperanto por grupeto da infanoj en lernejo-pensiono en Tbiliso, la ĉefurbo de Kartvelio. Legu prian artikolon en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2026/02/kartvelio/

## Grekaj atingoj

Jam okazis **komenca kunlaboro kun la Municipo de Paranestio kaj la organizo Peliti**, kadre de la ĉi-jara **Festo de la Semoj** (aprilo, post ortodoksa pasko). En tiu kunteksto estas planataj **esperantaj prezentoj kaj agadoj**, ligantaj la ideon de Esperanto kun komunumo, kunhavigo kaj kultura dialogo.
Se iuj el vi interesiĝas partopreni aŭ ĉeesti la feston, bonvolu kontakti min – mi volonte helpos por faciligi la praktikan flankon.

Due: surbaze de tiu sperto naskiĝis la ideo organizi **Balkanajn Tagojn de Esperanto** en Paranestio, dum la **somero (probable en julio)**, kun balkan-regiona karaktero, malgranda skalo kaj emfazo je renkontiĝo, dialogo kaj kunlaboro.

En ĉi tiu momento temas nur pri **esploro de intereso kaj disponeblo**, ne pri konkretaj decidoj. Mi planas prezenti la ideon pli detale dum nia **sekva reta kunveno la** danuba agado.

ndreas Zervas, Grekio

## Februaraj memordatoj

Antaŭ 130 jaroj, la 4an de februaro 1896 naskiĝis Harry Holmes (1896-1986), brita armea oficisto kaj esperantisto, komitatano, estrarano kaj vicprezidanto de UEA; dufoje dum sia vicprezidanteco Holmes estis aganta prezidanto de UEA.

Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por februaro 2026, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la Ondo de Esperanto" ĉe https://sezonoj.ru/2026/02/februaro-11/ [lo]

Kunlaborantoj: Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE) kaj Perlo Miela (HU)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu

# Juna amiko meritas vian abonon!

.

Juna amiko.

_._,_._,_

---


Groups.io Links:

You receive all messages sent to this group.

View/Reply Online (#6933) | Reply to Group | Reply to Sender | Mute This Topic | New Topic

---

La konversacioj en ĉi tiu listo estas privataj por la komunumo. Bonvolu ne afiŝi retpoŝtojn en vian blogon aŭ plusendi ilin, krom se vi certas, ke ĝi estas en ordo ĉe la verkisto.

: uea-membroj+unsubscribe@groups.io

---

Your Subscription | Contact Group Owner | Unsubscribe [paulo.pires@flugfolio.xyz]

_._,_._,_